

LA LITURGIO DE LA SANKTA ĴAŬDO

Enira Antifono

Ni fanfaronu pri la kruco de nia Sinjoro Jesuo Kristo.
En Li fariĝis al ni savo, kaj resurekto, kaj vivo.
Per Li ni estas redemptitaj kaj liberigitaj

aŭ:

→ *ADORU 311.1*

IV^a Ni fi - e - ru en la kru-co de Kris-to,
en ki - u es - tas vi - vo por ni kaj sa-vo.

The image shows two staves of musical notation. The first staff begins with a treble clef and a 'IV^a' marking. The notes are: G4, A4, B4, C5, B4, A4, G4, F4, E4, D4, C4. The second staff continues with: B3, A3, G3, F3, E3, D3, C3, B2, A2, G2. The piece ends with a double bar line.

aŭ: Enira Kanto

Se vi deziras vivi kiel Dio (Wie als een God wil leven hier op Aarde) → *ADORU 292*

Kolekto

Ĉiopova, eterna Dio,
en la vespero antaŭ Sia pasiono
Via amata Filo
konfidis al la eklezio la oferon de la nova kaj eterna interligo,
kaj fondis la festenon de Sia amo.
Bonvolu fari,
ke ni el tiu ĉi mistero ricevu abundon de vivo kaj amo.
Pri tio ni petas per Jesuo Kristo, Via Filo, nia Sinjoro,
kiu kun Vi,
en la unueco de la Sankta Spirito,
vivas kaj regas eterne.

Amen.

Unua Legaĵo

→ *ADORU 042.2*

Unua legaĵo
el la libro Eliro

Eli 12,1-14

- 1 Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo kaj al Aaron en la lando Egipta, dirante:
- 2 Ĉi tiu monato estu por vi komenco de la monatoj;
la unua ĝi estu por vi inter la monatoj de la jaro.
- 3 Diru al la tuta komunumo de Izrael:
En la deka tago de ĉi tiu monato prenu al si ŝafidon ĉiu patro de familio,
po unu ŝafido por domo.
- 4 Kaj se en la domo estas tro malmulte da personoj por tuta ŝafido,
tiam li prenu kune kun sia najbaro plej proksima al lia domo;
laŭ la nombro de la animoj, laĉ la kvanto de manĝado de ĉiu, ili kalkulu sin por la ŝafido.
- 5 La ŝafido estu sendifekta, virseksa, havanta la aĝon de unu jaro;
el la ŝafoj aŭ el la kaproj vi povas preni.
- 6 Konservu ĝin ĝis la dek-kvara tago de ĉi tiu monato;
kaj la tuta komunumo de Izrael buĉu ĝin en la komenco de vespero.
- 7 Kaj ili prenu iom el la sango, kaj ŝmiru sur ambaŭ fostoj
kaj sur la supra sojlo de la domoj, en kiuj ili ĝin manĝos.
- 8 Kaj ili manĝu la viandon en tiu nokto, rostitan sur fajro;
kaj macojn kun maldolĉaj herboj ili manĝu.
- 9 Ne manĝu ĝin duonkrudan, nek kuiritan en akvo,
sed nur rostitan sur fajro kun ĝiaj kapo, kruroj, kaj internaĵoj.
- 10 Ne restigu iom el ĝi ĝis la mateno;
kio restos el ĝi ĝis la mateno, tion bruligu per fajro.
- 11 Kaj tiele manĝu ĝin:
via lumbo estu zonita,
viaj ŝuoj sur viaj piedoj,
kaj via bastono en via mano;
kaj manĝu ĝin rapidante;
ĝi estas Pasko de la Eternulo.
- 12 Kaj Mi trairos la landon Egiptan en tiu nokto,
kaj Mi batos ĉiun unuenaskiton en la lando Egipta,
de la homoj ĝis la brutoj;
kaj super ĉiuj dioj de Egiptujo Mi faros juĝon, Mi, la Eternulo.
- 13 Kaj la sango ĉe vi estos signo sur la domoj, en kiuj vi troviĝas;
kiam Mi vidos la sangon, Mi pasos preter vi,
kaj ne estos inter vi la eksterma puno, kiam Mi batos la landon Egiptan.
- 14 Kaj tiu tago estu por vi memoraĵo;
kaj festu ĝin kiel feston de la Eternulo en viaj generacioj,
kiel leĝon por eterne festu ĝin.

Jen la parolo de Dio.

Responsorio Psalmo

Antifono:

Ĉu ne estas la kaliko de beno, kiun ni benas, partopreno en la sango de Kristo?

aŭ:

→ *ADORU 311.2*

VIIa La ka - li - ko, ki - un ni be - nas,
i - gas nin u - nu en Kris - to.

el Psa 116:

VII

- 12 Kion mi redonu al la Eternulo *
por ĉiuj Liaj bonfaroj al mi?
- 13 Mi levos la pokalon de savo, *
kaj mi vokos la nomon de la Eternulo.
- 15 Grandvalora en la okuloj de la Eternulo *
estas la morto de Liaj fideluloj.
- 16 Ho Eternulo, mi ja estas Via sklavo, /
mi estas Via sklavo, filo de Via sklavino; *
Vi disigis miajn ligilojn.
- 17 Al Vi mi oferdonos dankan oferon, *
kaj la nomon de la Eternulo mi vokos.
- 18 Miajn promesojn al la Eternulo mi plenumos *
antaŭ Lia tuta popolo.

Dua Legaĵo

→ *ADORU 042.3*

Dua legaĵo
el la unua letero de la apostolo Paŭlo al la Korintanoj

1 Kor 11,23-26

Gefratoj,

23 Mi ricevis de la Sinjoro tion, kion mi ankaŭ transdonis al vi,
ke la Sinjoro Jesuo
en la nokto, en kiu li estis perfidata,
prenis panon;

24 kaj doninte dankon, li dispecigis ĝin, kaj diris:
Ĉi tio estas mia korpo, kiu estas por vi;
ĉi tion faru por memorigo pri mi.

25 Tiel same ankaŭ la kalikon post la vespermanĝo, dirante:
Ĉi tiu kaliko estas la nova interligo en mia sango;
ĉi tion faru ĉiufoje, kiam vi trinkos, por memorigo pri mi.

26 Ĉar ĉiufoje, kiam vi manĝos ĉi tiun panon kaj trinkos la kalikon,
vi proklamos la morton de la Sinjoro, ĝis li venos.

Jen la parolo de Dio.

Kristo-Aklamo

→ *ADORU 311.3*

D Bm Em⁷ A⁷ D

Laŭ-don, Kris-to, Re-ĝo kaj Sa - van-to!

Novan ordonon mi donas al vi: *
ke vi amu unu alian.

Evangelio

Joh 13,1-15

→ **ADORU 042.4-6**

D: La Sinjoro estu kun vi.

K: Kaj kun via spirito.

D: El la evangelio laŭ Johano

K: Gloro estu al Vi, Sinjoro.

1 Kaj antaŭ la Paska festo Jesuo, sciante, ke lia horo venis, por ke li transiru el ĉi tiu mondo al la Patro, aminte siajn proprulojn, kiuj estis en la mondo, amis ilin ĝis la fino.
2 Kaj dum la vespermanĝo, kiam la diablo jam metis en la koron de Judas Iskariota, filo de Simon, la intencon perfidi lin, **3** Jesuo, sciante, ke la Patro donis ĉion en liajn manojn, kaj ke li venis de Dio kaj iras al Dio, **4** leviĝis de la vespermanĝo kaj demetis siajn vestojn; kaj li prenis viŝtukon, kaj sin zonis. **5** Poste li verŝis akvon en la pelvon, kaj komencis lavi la piedojn de la disĉiploj kaj viŝi ilin per la tuko, per kiu li estis zonita.
6 Tiam li venis al Simon Petro. Ĉi tiu diris al li: Sinjoro, ĉu vi lavas al mi la piedojn?
7 Jesuo respondis kaj diris al li: Kion mi faras, vi nun ne scias, sed poste vi komprenos.
8 Petro diris al li: Vi ja neniam lavos miajn piedojn.
 Respondis al li Jesuo: Se mi ne lavas vin, vi ne partoprenas kun mi.
9 Simon Petro diris al li: Sinjoro, ne nur miajn piedojn, sed ankaŭ la manojn kaj la kapon.
10 Jesuo diris al li: Kiu sin jam banis, tiu bezonas nur, ke oni lavu la piedojn, kaj li estas tute pura; kaj vi estas puraj, tamen ne ĉiuj. **11** Ĉar li konis tion, kiu perfidos lin; tial li diris: Vi ne ĉiuj estas puraj.
12 Kiam do li jam lavis iliajn piedojn kaj surmetis siajn vestojn kaj denove sidiĝis, li diris al ili: Ĉu vi scias, kion mi faris al vi? **13** Vi nomas min Majstro kaj Sinjoro; kaj prave vi diras, ĉar tia mi estas.
14 Se do mi, la Sinjoro kaj la Majstro, lavis viajn piedojn, vi ankaŭ devas inter vi lavi la piedojn. **15** Ĉar mi donis al vi ekzemplon, por ke vi ankaŭ faru tion, kion mi faris al vi.

Jen la parolo de la Sinjoro.

Dum aŭ post la Pied-Lavo

Kie karitat' (Ubi caritas et amor) → **ADORU 311.4, 311.5 aŭ 311.6**

Porpetoj:

→ *ADORU 043.2*

Ni preĝu al Kristo, kiu savas nin per sia korpo kaj sango:



Per Via lumo heligu ĉiujn homojn.
Per Via korpo nutru la Viajn.
Per Via sango sanktigu la eklezion.
Per Via forto protektu la vojaĝantojn.
Per Via vorto konsolu la afliktitojn.
Per Via beno helpu al la malsanuloj.
Per Via graco pardonu al la pekuloj.
Per Via Spirito loĝu en nia mezo.
Per Via amo plenigu nin.
Per Via reliviĝo vivigu niajn mortintojn.

Per Vi ni gloras la Patron en la Sankta Spirito nun kaj eterne.

Amen.

Ofera Preĝo:

Dio,
ebligu al ni celebri digne la misteron de la altaro,
ĉar kiam ajn ni memoras Lian oferon,
ĝi fariĝas por ni efika kaj sava
per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

Prefacio

→ **ADORU 044.1**

C: La Sinjoro estu kun vi.

K: Kaj kun via spirito.

C: Leviĝu viaj koroj.

K: Ni havas ilin ĉe la Sinjoro.

C: Ni danku al la Sinjoro, nia Dio.

K: Estas inde kaj juste.

Vere estas inde kaj juste, ĝuste kaj save,
ke ni ĉiam kaj ĉie danku al Vi, Patro sankta,
/ per Kristo nia Sinjoro.

Li mem sin oferis en sava ofero
/ kaj al ni ordonis, ĝin celebri je sia rememoro.

Lia korpo fortigas nin, kiam ni ĝin manĝas,
/ Lia sango purigas nin, kiam ni ĝin trinkas.

Pro tio, ' unuigitaj kun la anĝeloj
/ ni laŭdas Vin, ĝoje dirante:

Enmetaĵo en la Eŭkaristia Preĝo

... – tio estas hodiaŭ – ...

Fina Preĝo

Ho ĉiopova Dio,
hodiaŭ per la Sankta Manĝo de Via Filo Vi fortigis nin.
Bonvolu satigi nin en la ĉiela festeno per vivo eterna.
Pri tio ni petas per Li, Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

Dum kaj post la Transigo de la Sakramento

Melodio → **ADORU 378**

Teksto: http://wikisource.org/wiki/Pange,_lingua_..._corporis

Kantu, lango, pri la glora
sankta korpo de Jesu'
kaj pri lia sang' valora,
kies riĉa beno-flu'
el la pek' de l' mond' rankora
savis tiam, savas plu.

El Maria naskiĝinta,
el la ĉasta Virgulin',
Dian semon disdoninta
kvazaŭ el abunda sin',
fine sur la kruc' mortinta
Kristo ne forlasis nin.

Kun la siaj kunsidante
ĉe la last-vesper-festen',
la ordonojn plenumante
de la paska nokt-solen',
nove panon disdonante
vere donas li sin mem;

Ĉar la pan' fariĝas karno
per la karniĝinta Vort'
kaj la vino lia sango
per la Di-Spirita fort':
Tion krede ni konfesu
kor-sincere ĝis la mort'.

→ **ADORU 378**

Riverence ni kliniĝu
antaŭ tiu sakrament'.
Jen Jesu', manao vera
de la nova testament'.
Manke nin informas vido,
fido estu suplement'.

Estu gloro kaj adoro,
laŭdo, beno kaj jubil'
al la sankta Triunuo:
al la Patro, al la Fil',
al la Sankta Di-Spirito:
unu lum', triopa bril'.

Amen

Pange, lingua, gloriosi
corporis mysterium,
sanguinisque pretiosi,
quem in mundi pretium
fructus ventris generosi
Rex effudit gentium.

Nobis datus, nobis natus
ex intacta Virgine,
et in mundo conversatus,
sparso verbi semine,
sui moras incolatus
miro clausit ordine.

In supremæ nocte cenæ
recumbens cum fratribus,
observata lege plene
cibis in legalibus,
cibum turbæ duodenæ
se dat suis manibus.

Verbum caro, panem verum
verbo carnem efficit,
fitque sanguis Christi merum,
et, si sensus deficit,
ad firmandum cor sincerum
sola fides sufficit.

→ **ADORU 379**

Tantum ergo Sacramentum
veneremur cernui,
et antiquum documentum
novo cedat ritui;
præstet fides supplementum
sensuum defectui.

Genitori Genitoque
laus et iubilatio,
salus, honor, virtus quoque
sit et benedictio;
procedenti ab utroque
compar sit laudatio.

Amen.